Kiam mi unue loĝis eksterurbe, mi plantis laktukon en la ĝardenon, ĉar plaĉas al mi freŝa salato. Oni diras, ke estas facile kreskigi laktukon, sed tio ne estis mia sperto. Oni devas planti ĝustatempe, senfine sarki la terpecon, kaj akvumadi la etajn plantojn. Spite de ĉio la suno ofte bruldifektas ilin, aŭ eble kuniklo havas belan manĝon pro ili.

Unu tagon mi ekrigardis tra la fenestro, kaj rimarkis kunikleton mordetantan la herbon. Mi ekpensis, "Ne estas juste, ke la kuniklo manĝu senlaborante dum mi devas tiom labori por mia salato."

Tiumomente mi subite rememoris neordinaran aferon, kiu okazis en Bostono kiam mi estis juna knabino. Ĉiuprintempe multe da virinoj (origine el Italujo) iradis tra la najbaraĵo kaj fosadis leontodojn el la herbejoj. La tutan tagon ili fosadis kaj metadis la herbaĉojn en siajn grandegajn antaŭtukojn. Kiam unu el ili havis sufiĉe, ŝi faris pakajon el la antaŭtuko, kaj metante ĝin sur la kapon, gracie solenpaŝadis for. Ni la infanoj ensorĉiĝis je la spektaklo, kaj la domposedantoj ĝojis pro la fakto, ke la kreskaĵoj estis senpage formovitaj el la herbejo. Sed neniu pripensis la kialon de tiu fremda kutimo. Ni tute ne konsideris leontodon kiel eblan nutraĵon.

Kiam mi rememoris pri tio, mi diris al mi mem, "Eble la Italinoj kaj la kunikloj havas la ĝustan ideon — rikolti sen semi. Mi devas esplori pri leontodoj."

Do mi legis kaj studis multe. Kaj tio, kion mi lernis, malfermis al mi ensorĉitan novan mondon. Ĝi ebligis al mi rekoni sufiĉe da sovaĝaj verdaj aĵoj por satigi miajn bezonojn. De tiam mi ne plu semas laktukon, sed bonvenigas la vagantajn semojn, blovitajn de la aŭtunaj ventoj, dum ili falas teren kiel manao el ĉielo. La laborproblemo estas solvita. Mi trovis fakte, ke la herbejo ja estas granda kaj bonega salatujo!

Ĝis nun mi jam fosis el mia herbejo mangeblajn herbaĉojn jene: leontodo, plantago, piproherbo, okzalo, rumekso, persista ajlo, portulako, amara kreso, kenopodo blanka (usone *pigweed*), fitolako amerika (*pokeweed*), stelario (*chickweed*) kaj pika laktuko. Ĉiuj estas tre ordinaraĵoj, facile rekoncible. Kompreneble troviĝas eĉ pli multe da specoj ol tiuj en mia herbejo, sed mi ne ankoraŭ scias ĉu ili estas mangeblaj.

Oni devas kolekti herbaĉojn kiel eble plej junajn, plejparte printempe. Tamen, la leontodon, la plantagon kaj la stelaron oni povas trovi dum la tuta jaro, dum la



PLANTAGO

portulako kreskas nur dum la varmaj someraj monatoj. La herbolibroj rekomendas, ke oni boligu ilin mallongtempe, sed mi kutime manĝas ilin nekuiritajn por konservi la vitamenojn. Ili estas riĉaj je vitamenoj kaj mineraloj, kaj entenas klorofilon, kvankam bedaŭrinde ili ne havas lertajn publikigistojn, kiajn havas fabrikistoj de dentopasto.

Oni devas alkutimiĝi al la gusto de herbaĉoj, pro tio, ke ili estas pli pikaj ol la sengusta "butika" laktuko. Tio estas ĉar ili entenas abundon da kalio.

La leontodo meritas gravan lokon en la herbofamilio. La tuta kreskaĵo — radiko, folio, kaj floro — estas manĝebla. Ĝi entenas kalion, kalcion, natrion, magnezion, kupron kaj la vitamenojn A, B, C kaj D. La floro mem estas tre riĉa je vitameno D. Ĝia ĉefa valoro estas por konstrui la ostan strukturon de la korpo, precipe la dentojn. Mi povas menciigi, ke la plej populara uzo por ĝia radiko estas kiel kafoanstataŭaĵo. Oni diras, ke ĝi bon-



LEONTODO

gustas kaj estas sen la malbonefikoj de kafo. Mi neniam provis ĝin, sed tio eble estos farinda, se la kafoprezo daŭre plialtiĝos.

Alia nutroplanto, la tiel nomata "Jerusalema artiŝoko", estas agrabla anstataŭo por terpomoj. Ĝi estas preskaŭ libera de sukero kaj amelo, kaj entenas naturan insulenan. La nomo estas erariga, ĉar ĝi estas nek artiŝoko, nek de Jerusalemo, sed indiĝena tubero de Nord-Ameriko. La vorto *Jerusalemo*

estas aliigo de *girasole* (sunfloro) en la itala lingvo. Tiun nomon oni donis al la herbaĉo, kiam la fruaj esploristoj portis ĝin al Eŭropo. La vera nomo do Esperante devas esti *belianto tubera*. Estas interese rimarki, ke tiu herbaĉo estas favore menciita en la taglibro de la ekspedicio Lewis kaj Clarke, kiu esploris la nord-okcidentan parton de Usono en 1805. La indianoj instruis al la esploristoj kiamaniere elfosi kaj kuiri la tuberojn. Mi uzas ilin en salato por doni firmecon.

La indianoj vaste uzis ankaŭ la herbaĉon *asklepio siria* (milkweed). Ili kuiris la semujojn kun bizonoviando. La kreskaĵetoj similas al spinaco, sed bezonas pli da kuirado.

Efektive, la amerikaj indianoj vivtenis sin per naturaj nutraĵoj. Ili havis profundan scion pri ĉiuj specoj de manĝeblaj kreskaĵoj inkluzive radikoj, trunketoj, folioj, semoj, nuksoj kaj beroj. Ekzemple, eĉ hodiaŭ la triboj de Nov-Meksiko multe utiligas la *kenopodon blankan*, kiu troviĝas apud ĉiu "pueblo" (indiana loĝejo). Ili manĝas ĝin aŭ boligitan aŭ nekuiritan, kaj faras grion el la semoj. (turnu)



KENOPODO

HELIANTO

La pika laktuko estas antikva kreskaĵo, kiu laŭ kelkaj botanikistoj, estas la preparenco de la moderna kulturita speco. La folioj turniĝas direkte al la suno. Tial oni nomas ĝin la kompasoplanto. La junaj folioj estas tre delikataj kaj bonegaj por salato. Oni povas ankaŭ kuiri ilin kaj utiligi kiel legomon.

La ordinara plantago ankaŭ estas tre utila herbaĉo. Ĝi entenas kalion, kalcion, kloron, feron, sulfuron kaj fluoron. Ĝi povas esti uzata kiel salato, legomo, aŭ teo. Estas du specoj: unu kun larĝaj folioj, la alia kun mallarĝaj; ambaŭ manĝeblaj.

Bona stimulilo por laca cerbo estas la ĉiea stelario. Ĝi estas malforta kreskaĵo kun etaj blankaj floroj, kaj entenas multe da fosforo.

Tutmonde la indigenaj plantoj estas pli multe uzataj ol en Usono. La portulako, malestimata ĉi tie kiel avidega herbaĉo, ofte estas videbla en la vendejoj de Meksiko. En Francujo la kreskaĵetoj de *fitolako amerika* estas komerce vendataj. Orientaj popoloj zorge kolektas kaj vaste uzas siajn proprajn sovaĝajn plantojn. En Japanujo oni alte taksas la ordinaran pterison (angle *bracken*) kiel frandaĵon en supo.

Mi finos mian rakonton per salata recepto, taŭga por la printempo:



Printempa Salato

Jen, pladon pretigu
Per ajlo sovaĝa;
La pladon plenigu
Per mikso herbaĵa:

Piproherbo por pikeco,
Helianto por freŝeco,
Leontodo por akreco,
Piklaktuko por mildeco,
Por la samo la rumekso;
La okzalo – acideco,
La plantago por saneco.

Kunmarinu kun miksaĵo
Iom da ole-vinagro,
Stelario por garnaĵo.
Jen bongusta herb-
manĝaĵo!
Taŭga por epikuristo;
Same por Esperantisto.

Postskribo: Jes, la ordinara herbo ankaŭ kreskas en mia herbejo. Tamen, pli ol unufoje la najbaroj rimarkigis al mi, ke estas pli da herbaĉoj ol herbo. Tute ne gravas, ĉar mi nun troviĝas en bona kompanio de Italinoj kaj kunikloj!

ESPERANTA KRONIKO

En la ĵurnalo "Caldwell Progress", Caldwell, N. J., aperis tre bona "Letero al la Redaktoro" skribita de Joan Dahlen. F-ino Dahlen estas klasano en la ĉi-jara Esperanto-kurso de nia senlaca propagandisto F-ino Elsie Yungbans.

Elwood R. Etter, Ohio, estas tre helpa kaj bonkora samideano. Dum jaroj li presis membarkartojn, glumarkojn, kovertojn, k. s., por la Kongresoj de EANA. Denove li faris same por la 44a en Nov-Jorko. S-ro Etter elspezas tempon kaj monon en tiu sindona servado al EANA. Vere li meritas nian altan estimon kaj dankon de ni ĉiuj.

Germana Esperanto-Hejmo, Baden-Baden, Germanujo, estas pli kaj pli konata kiel bela kaj ĝuinda libertempejo. Tiu nova "Esperanto-Domo" (vere Esperanto-Hejmo) estas sub mastrumado de S-ino Agnes Miller. Ĉiuj kiuj intencas iri al Eŭropo devus sciigi pri la oportunoj por tre ĝuinda restado ĉe la Esperanto-Hejmo. Petu informojn de: S-ino Agnes Miller, Esperanto-Hejmo, Baden-Baden, Werderstrasse 14, Germanujo.

DIVERSAJ ANONCOJ

Plej koran dankon ni esprimas al A. M. Brya, kiu nove aligis al la Subtena Komitato de EANA kaj tiel lojale helpas al nia Asocio.

Novaj Membro-Patronoj de EANA: La sekvantaj freŝdate renovigis sian membrecon en EANA en la alta kategorio de Patrono: *S-ino Leslie Davis, Afonso Corrêa, Isabel Snelgrove, Jack M. Warner, Norman Fyffe.*

"Amerika Esperantisto" en Bibliotekoj. La sekvantaj membroj bone subtenas kampanjon por meti AE en bibliotekojn tra Usono: *A. I. Rogus (12) kaj Thomas M. O'Neill (10).* Sinceran dankon!

Oficialaj Atestoj de EANA estis donitaj al la sekvantaj personoj: *Norma Albert kaj Eugene Albert – "Atesto pri Lernado"; Henry Kruse, Jr., Barbara Bellis, Kenneth Franklin, Dolores Landis, Elizabeth Landis, Hazel Knappenberger, Janet Evans, Robert Beck, Richard Beecher, Lee Coffee, Larry Fussell, Harold Pierson – "Atesto pri Kapableco".*

Sukcesojn en la kampanjo "Ĉiu Membro Varbu Unu Novan Membron" ni kun danko registras por la jenaj personoj: *Miriam Atherton (2), Alex Wesser (2), S. M. Williams (9), M. Melrose (1), Don Walton (1), John M. Brewer – MOSAMO (5), Donald W. Hathaway (1), David Glover (1).*

Propono de Lilio Fuller: "La meza parto de Junio estas bona tempo por membroj de EANA skribi *Leterojn al Redaktoroj*. Oni povas tre trafe enkonduki informojn pri Esperanto per mencio de la nacia kongreso de EANA kaj pri la Universala Kongreso en Haarlem, Nederlando". Tiun proponon ni forte rekomendas al niaj membroj.

Wear the green star! Every Esperantist should wear the green star to show his colors! You will find a varied assortment listed on the inside back cover of this issue of AE. (10% discount to members of EANA on all prices.) Order your green star now!

Green Stars in Ceramic: A decorative green glazed ceramic pin 1¼" diameter with safety catch. Very effective as a scatter pin for ladies, 65¢ each postpaid. (10% discount to members). Order from EANA.

La Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio 1954 (al kiu EANA estas aliĝinta kiel landa asocio) aperis kun interesa enhavo. 287-paĝa, ĝi entenas sciindaĵojn pri la internacia Esperanta movado, adresaron de delegitoj, ktp. Ĝi estas havebla kun individua membreco en UEA (MJ) je \$1.25. Sendu vian kotizon, \$1.25, al la Centra Oficejo de EANA kaj vi tuj ricevos membro-karton de UEA, membro-markojn, kaj 287-paĝan Jarlibron.

New Leaflet on Esperanto Available for Promotion Activities

The excellent six-page leaflet "Tune in on the World" has been reprinted by EANA and is now available at cost to all members and friends of EANA. It is richly illustrated and gives the reader many facts on Esperanto, ways in which to use Esperanto, and comments on the interlanguage by prominent personalities. Buy them in quantity and put them to use for your promotion of Esperanto. Price postpaid 1 dozen for 20¢; 100 for \$1.50.

ESPERANTA KRONIKO

En la jara Honora Kunveno de la Kolegio pri Minoj kaj Metalurgio, Rolla, Misurio, partoprenis kvin studentoj de la tiea Esperanta klubo *MOSAMO*. Profesoro *John M. Brewer*, konsilanto de la Klubo, prezentis je la sama tempo al la kvin honoraj studentoj Atestojn de EANA.

S-ino Edna MacDonald parolis pri Esperanto antaŭ studentoj de la kvara studjaro en la Altlernejo de Lawrence, N. Y.

La Monda Organizo por Sano, kun sidejo en Svisujo, elsendis artikolon Esperante verkitan pri "La Flegistino, Pioniro de la Sano". *D-ro M. G. Gandau*, Ĝenerala Sekretario de la MOS, en la artikolo proponis tiun temon honore al la flegistino okaze de la Monda Tago de Sano 1954

En Milwaukee, Viskonsio, *Jarvis E. Bush* parolis pri Esperanto antaŭ grupo en loka preĝejo. S-ro Bush ankaŭ raportas, ke la Tosa Rondo Esperanta daŭre kunvenas kaj multe ĝuas internacian korespondon.

La Esperanto-Societo de Ĉikago, en sia kunveno de 12-a de Majo, aranĝis specialan programon al kiu ĝi invitis la publikon. *S-ino R. E. Holland*, sekretario, parolis pri siaj korespondantoj tra la mondo kaj montris fotografaĵojn per lumbildoj. *Donald W. Hathaway*, prezidanto, klarigis pri sia Esperanto-kurso por blinduloj. Poste la ĉeestantaro vidis la novan kolorfilmon "Aŭstralio Hodiaŭ". Aperis anonco pri la kunveno en lokaj gazetoj.

En kunveno de Instruista Asocio, Naperville, Ilinojo, *Roy E. Holland* parolis pri Esperanto. Multaj instruistoj interesiĝis pri la interlingvo.

En Kolegio Brooklyn, *Eugene Albert* parolis pri "Esperanto kaj Internacia Korespondado" antaŭ la Klubo pri Internaciaj Rilatoj.

En la fama Kolegio "Cooper Union", Nov-Jorko, la 29-an de Aprilo, okazis demonstracio de Esperanto, prezentita de *Ges-roj Ray Kelly*. Membroj de la Studenta Monda Federalista Klubo kaj profesoroj de la kolegio entuziasme partoprenis la kunvenon.

S-ro Lennart Magnusson, Esperantisto el Malmø, Svedujo, vizitis en Nov-Jorko dum pasintaj monatoj. Li partoprenis kunvenon de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko kaj transdonis oficialajn salutojn de la Esperanto-Societo de Malmø.

Dianto Chomette Farnsworth, Los Angeles, parolis pri Esperanto la 20-an de Majo, en la fama televida programo de Groucho Marx.

Konferenco de Bibliotekistoj de Orienta Pensilvanio, en la Ŝtata Kolegio, Kutztown, Pa., havis oportunon vidi grandan ekspozicion de Esperanto pro la iniciativo de *Donald Munro*. La vojaĝanta ekspozicio de EANA estis lokita dum Marto en Universitato Lehigh, Bethlehem, Pa., kaj poste dum Aprilo en Kolegio Kutztown. La granda pres-asocio AP dissendis informojn pri la ekspozicio kaj atentigis, ke en tiu regiono krom la uzado de la lingvoj angla kaj "Pennsylvania Dutch", oni ankaŭ komencas studi Esperanton.

En la brajla gazeto "The Home Teacher" aperis represo de artikolo pri la fondo de Nord-Amerika Brajla Esperanto-Fratara – artikolo kiu unue aperis en Januaro en *The Newark Sunday News*. Informoj pri NABEF jam aperis en naŭ Nord-Amerikaj brajlaj gazetoj. La nova organizo por frateco inter blindaj Esperantistoj estas oficiala filio de EANA. Brajla letero, presita senpage de la *Volunteers for the Blind*, Philadelphia, kaj helpe de Donald F. Walton de la Esperanto-Asocio de Nov-Jerzio, estis sendita al ĉiuj konataj blinduloj en Usono kaj Kanado. La letero verkita de Henry Kruse, Jr., anoncas pri la fondo de NABEF, priskribas Esperanton por la blinduloj, kaj ĝenerale informas pri la nova filio kiel ĝi estas helpa al la blinduloj kaj al la Esperanto-movado. Ekzemplero de la letero estos sendita al iu ajn blindulo kiu deziras ĝin. Ni petas, ke membroj de EANA helpu tiurilate. Sendu petojn al: *Henry Kruse, Jr., General Secretary, North American Braille Esperanto Fraternity, 107 Center Ave., Chatham, N. J.*

D-rino Luella K. Beecher, Lima, Ohio, prezidanto de la Lima Esperanto Asocio (oficiala filio de EANA), revenis al sia kutima aktiveco en Lima. D-rino Beecher estas elstara subtenanto de EANA, kaj elstara estro de loka Esperanto-grupo. Kaj en la Baha'i-Kredo ŝi estas amata kaj grava estrino ne nur en Nord-Ameriko sed ame konata tra la mondo. Esperanto inter Baha'i-anoj kreskas pro la bona ekzemplo kiun ŝi montris dum la jaroj.



NEW ESPERANTO BOOKS JUST RECEIVED



- Fervoja Terminaro*, E. Rosher. Construction, laying of tracks, plans of bridges, signals for railroads with dictionary of terms, 67 pp.. \$.35
- Katalogo de Oficialaj Poŝtaĵoj kun Esperanta Teksto*. Complete list to 1945, illustrated with many stamps and postmarks, 16 pp..... .25
- Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj*, pub. by *Slovenia Esp. Ligo*. History of old Jugoslavia, plus highly political propaganda for the regime of Tito, nicely bound, stamped in gold, profusely illustrated, 304 pp. 2.65
- Nomaro de Svedaj Birdoj*, Birger Gerdman. List of birds in Swedish, Latin and Esperanto, hektograph reproduction, 16 pp..... .25
- Elektroteknika Terminaro*, S. Alexandersson, electrotechnical terms in Esperanto and Swedish, hektograph reproduction, 24 pp..... .35
- The Esperanto Teacher*, Mason Stuttard. A new Esperanto text-book in 20 lessons, with "Key" to exercises and vocabulary, (note that the pronunciation given is not correct for American usage), 108 pp .45
- Atakoj Kontraŭ Gardenplantoj*, Dr. Paul Neergaard. A full, scientific explanation of plant diseases, 9 full pages of pictures in color, 80 other illustrations, well bound in red cloth, 230 pp..... 3.10
- Klasifo de Esperantaj Temoj*, Montagu Butler. Scientific analysis & full details for adapting the decimal system to Esp. books, 144 pp 1.75

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.



DEZIRAS KORESPONDI



Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Anglujo.** John Pennington, 203 Hilary Ave., *Liverpool* 4. Dez. kor. kaj interŝ. gazetojn, interesiĝas pri astronomio kaj radio.
- Japanujo.** Chuko Yu, ĉe "Chuka Nippo", Tenroku-Hankyu Bldg, No. 5, 6 chome, Tenjinbashi, Oyado-ku, *Osaka*. Serĉas spertan ĵurnaliston por sendi informojn pri sia lando por uzo en ĵurnaloj.
- Svedujo.** Olle Hill, Djulogatan 59, *Katrineholm*. Sveda filatelisto dez. interŝ. PM kaj memorstampitajn poŝtkartojn de la tuta mondo. Ofertas: Svedujo, Norvegujo kaj Germanujo. Respondo garantiata.
- Nederlando.** F-ino C. J. Duyvetter, Burgem Patynlaan 120, *Zeist*. Estrino de eduklernejo por 4-6 jaraj infanoj dez. kor. kun instruistinoj.
- Argentino.** Omar Eugenio Argerami, Cespedes 3222, *Buenos Aires*. Dez. korespondi kun eksterlandaj samideanoj.
- Argentino.** Prof-ino Matilde Laurenza, Vieytes 99, *Banfield, F.C.N.G.R.* Pcia de Buenos Aires. Junaj gelernantoj deziras korespondi.
- Francujo.** Esperanto, *Mulhouse* (70). Miloj da franc(in)oj deziras amikiĝi kun simpatiaj alilandul(in)oj.
- Nederlando.** F-ino L. Weijer, Reehorsterweg 36, *Ede*. Lernanto, 11-jara knabo deziras korespondi.
- Svedujo.** Bernt Johansson, Vasterviksgatan 19, *Halsingborg*. 10 gelernantoj, 25-40 jaraj deziras korespondi kun la tuta mondo.
- Danlando.** F-ino Anna Lise Christensen, Horning Central, *Volk Molle*. 33-jara komencantino deziras korespondi.
- Japanujo.** F-ino Akie Niŝikaŭa, 1, 8-tyōme Nakamizomati, Yakuin, *Hukuoka-si*. 18-jara, dez. kor. pri literaturo, kino, manlaboro.
- Japanujo.** Yasushi Araki, c/o Kwansei Gakuin University, *Nishinomiya, Hygo*. 26-j. docento, dez. kor. pri literaturo, filologio, interŝ. PM.

EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1954

The Central Office has enjoyed serving the members of EANA during the past year. It is now time for many of you to renew your membership for 1954.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "associate membership" in the international association UEA. You receive coupons (called "membromarkoj") of UEA, and have a right to services of delegates throughout the world.

In addition there are "individual membership" categories in UEA: the *Yearbook* (containing lists of delegates) is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually.

Now is the time for you to renew your membership in your North American association EANA, and in the general international association UEA. Here are the combined membership rates for 1954:

	<i>Armed Forces, H.S. & College</i>	<i>Active Member</i>	<i>Patron Member</i>
EANA Membership & associate of UEA:	\$3.00	\$5.00	\$10.00
EANA Membership & <i>Yearbook</i> of UEA:	\$4.25	\$6.25	\$11.25
EANA Membership with <i>Yearbook</i> and magazine <i>Esperanto</i> of UEA:	\$6.00	\$8.00	\$13.00

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".

PRACTICAL ESPERANTO , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
REED'S PRACTICAL GRAMMAR , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
UNIVERSALA ESPERANTO-METODO , Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....	Cloth 6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 2.00
ESPERANTO (World Language Series) , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
WORLD'S CHIEF LANGUAGES , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....	Cloth 6.00
EDINBURGH DICTIONARY . Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....	Cloth .85
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
PLENA VORTARO DE ESPERANTO , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....	Cloth 4.50
<i>Rare</i> , exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....	Cloth 6.00
FUNDAMENTA KRESTOMATIO , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.85
Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards....	Half-Cloth 2.50
KARLO , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio) . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
ESPERANTO SORTIMENTO . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgolino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Mizerere</i> , music story, & <i>Tbais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Rozujo Ĉiumiljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS . Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
INDIAN BEAD STAR . Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
GREEN STAR PENDANT . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia...	.75
ENAMEL GREEN STAR . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of Doris Tappan Connor. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. NOW, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



- The complete "Connor Course" includes the following:
- (1) A lively text, "Esperanto: The World Interlanguage."
 - (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
 - (3) A practical and easy-to-follow "Study Guide" (82 pp.)
 - (4) Personalized instruction and guidance of Mrs. Connor.
 - (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
 - (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
 - (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "Connor Course", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete master course at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order NOW:

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.